

Alvenis la unuaj dozaj de ĉina vakcino CoronaVac al Brazilo



Sao Paŭlo, nov 19 (Reuters) Laŭ informoj de tiu ĉi agentejo, alvenis la unuaj 120 mil dozaj de vakcino kontraŭ la Covid-19 evoluigita de la ĉina kompanio Sinovac Biotech kies nomo estas CoronaVac.

La vakcino estas elprovata en Brazilo. La dozaj estos stokitaj en ne konata stokejo pro tio ke oni atendas la aprobon de la landa regula institucio Nacia Agentejo de Sanitara Gvatado (Anvisa) por ĉia uzo.

La kargo alvenis en 7 konteneroj frizigitaj kaj ĉi estas parto el tuto de ses milionoj da dozaj importataj el Ĉinio por ĉia uzo en januaro.

La aŭtoritatoj de Sao Paŭlo ne kalkulis la momenton por ĉia distribuo. Dum gazetara konferenco en la lastaj tagoj la registaro informis ke ankoraŭ oni faras la lastajn elprovojn de la fazo 3 en Brazilo, Indonezio kaj Turkio por taksu ĉian efikecon kaj sekurecon.

La aprobo de CoronaVac ne finiĝos antaŭ la 21-a de decembro kaj povus eĉ daŭri ĉis la unua semajno de januaro, esprimis al la gazetaro de la direktoro pri inspektoj de Anvisa, Ronaldo Gomes.

Teamo de Anvisa estas nun en Pekino kompletigante kvarentenan periodon du-semajnan en hotelo antaŭ ol viziti laboratorion de Sinovac por certigi la produktadan praktikon de la vakcinoj, kiu estas nepra por ties rajtigo en Brazilo, li aldonis.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/240169-alvenis-la-unuaj-dozoj-de-cina-vakcino-coronavac-al-brazilo>



Radio Habana Cuba